# Sufikso –in/o

**La sufikso –in/o karakterizas estaĵon apartenantan al la sekso organizita por gravediĝi kaj naski.**

Sufiksa rolo 1:
Formado de bestaj nomoj.

| | |
|---|---|
| bovo | bovino |
| koko | kokino |
| kato | katino |
| hundo | hundino |
| ŝafo | ŝafino |

Sufiksa rolo 2:
Formado de homaj parenconomoj.

| | |
|---|---|
| patro | patrino |
| filo | filino |
| frato | fratino |
| onklo | onklino |
| kuzo | kuzino |
| avo | avino |

Sufiksa rolo 3:
Formado de nomoj esprimantaj kvaliton, funkcion.

| | |
|---|---|
| amato | amatino |
| karulo | karulino |
| viro | virino |
| reĝo | reĝino |
| kuracisto | kuracistino |

Sufiksa rolo 4:
Formado de propraj nomoj el viraj nomoj.

| | |
|---|---|
| Paŭlo | Paŭlino |
| Johano | Johanino |

**Ino: La sufikso –in/o memstariĝis kun la signifo de estaĵo de ina sekso.**

Virbestoj kaj iliaj inoj. Ina sento. Inaro. Inejo. Ineco.